

La babiladaj rondoj okazos je la 19h30 vendrede

La gastiganto preparas mem simplan manĝaĵon (manĝon kaj deserton). La invitatoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Alfine, ĉiuj donacas monon al la gastiganto por partopreni al liaj elspezoj.
Kiam okazas ĉe Espace Dickens, oni ankoraŭ partoprenas al la lupago.

"Ambaŭ grupoj" : la 7-an de oktobro 2016

Monique kaj Giulio invitas nin ĉe Espace Dickens
tél. 079 754 21 60

"Okcidentaj" :

la 21-an de oktobre

ĉe Francisko Randin
Vallombreuse 14, 1004 Lausanne
Tél. 076 411 14 55



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd>

"Orientaj" :

la 23-an de septembro

ĉe Knud kaj Marie-Antoinette Sunier
av. des Alpes 150, Montreux
Tél. 021 961 38 56



Aliĝu ĉe:

<http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6>

Bazaro place de la Palud en Laŭzano la 1-an de oktobro (lasta)

Por partopreni, aligu ĉe : <http://doodle.com/poll/4i9p85gmbb7y7wen>

Laŭzana Esperanto - Societo

Poŝtfako - Case postale 246 * CH - 1000 LAUSANNE 22
+41 76 411 14 55 * +41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto - CCP 10-26785-8

Prez.: David Buhmann * 021 624 36 38 - Vicprez.: Charlotte Blanc
Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 -

Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43

Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56

Informilo

oktobro 2016 - n° 8

Lunde, la 3-an de oktobro je la 20-a
ĉe Espace Dickens (Dickens 6), Laŭzano
Prelego de Cléa kaj Charlotte
pri la 101-a UK en Slovakio

Lunde la 7-an de novembro

Decidota temo

Sabate la 17-an de decembro

Zamenhofa festo

Lunde la 9-an de januaro 2017

Decidota temo

Lunde la 6-an de februaro 2017

Ĝenerala asembleo

Citaĵo

De tempo al tempo, estas bonidee halti nian
serĉadon de feliĉo kaj simple esti feliĉa.

Guillaume Appolinaire (1880-1918)

Laŭzana Esperanto-Societo

La eta princo

Pardonu infanoj, ke mi dediĉis ĉi tiun libron al "grandulo". Mi havas seriozan senkulpigon: tiu grandulo estas la plej bona amiko, kiun mi havas en la mondo. Mi havas alian senkulpigon: tiu grandulo kapablas ĉion kompreni, eĉ porinfanajn librojn. Mi havas trian senkulpigon: tiu grandulo loĝas en Francio, kie li suferas pro malsato kaj malvarmo. Li ja bezonas konsolon. Se ĉiuj tiuj senkulpigoj ne sufiĉas, mi volonte dediĉos ĉi

libron al la infano, kiu iam antaŭe tiu grandulo estis. Ĉiuj granduloj unue estis infanoj. (Sed malmultaj el ili memoras pri tio.) Mi do korektas mian dediĉon:

Al Léon Werth,
kiam li estis malgranda knabo.



Iam, kiam mi estis sesjara, mi vidis belegan bildon en iu libro pri la praarbaro, titolita "Travivitaj rakontoj". Tiu bildo prezentis boaron, kiu glutas rabobeston. Jen kopio de la desegno:



En la libro oni diris: "La boaj glutas sian rabojon unuglute, senmaĉe. Sekve ili ne plu povas moviĝi kaj dormas dum sia sesmonata digestado."

Ekde tiam mi multe meditis pri la aventuroj en ĝangalo kaj per kolorkraĵono mi sukcesis miavice fari mian unuan desegnon. Mian desegnon numero Unu. Jen kiel ĝi estis:



Mi montris mian ĉefverkon al granduloj kaj ilin demandis, ĉu mia desegno timigis ilin.

Ili al mi respondis: "Kial ĉapelo timigus?"

Mia desegno ne prezentis ĉapelon. Ĝi prezentis boaron, kiu digestadas elefanton. Do, mi desegnis la enhavon de la boao,

por komprenigi al granduloj. Ili ĉiam bezonas klarigojn. Jen kiel aspektis mia desegno numero Du:

